



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 197

Septembro 2002

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



Charlotte Kohrs — Nekrologo

Mia kara amikino, Charlotte Kohrs, honora membro de ELNA ekde 1999, forpasis en San Diego, Usono la 31-an de julio 2002 je la aĝo de 92 jaroj, postlasante filinon Molly kaj du nepojn. Ŝi estis emerita specialisto pri parolo kaj lingvo, kaj ankaŭ verkis librojn por helpi infanojn kiuj havis problemon pri legado. Ŝi esperantistiĝis en 1984 post la forpaso de sia kara edzo, kaj dediĉis sin al la instruado de Esperanto al infanoj. Charlotte estis la verkistino de multaj esperantlingvaj infanaj instrulibrojn, de 12 konversaciaj kantoj por lernigi Esperanton al lernejoj, kaj la fondinto de "Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo". Alia bona ideo de ŝi estis la "Mondo-Rondo", kiu estis internacia koresponda projekto inter infanaj grupoj pri amikeco kaj geografio. Ŝi sukcese gvidis ĝin dum kvar jaroj ĝis sia sano malboniĝis.


Mi neniam persone renkontis Charlotte, sed ni amikiĝis en 1991 kiam ŝi koresponde persvadis min peni iniciati Mondo-Rondan klason en mia loka lernejo. Pro ŝia instigo mi aŭdacis peti la lernejestrinon, ĉu ŝi permesus ke mi komencu Mondo-Rondan projekton en la lernejo. Mi akiris permeson kaj ekde frua 1992 ĝis 1995, letere kaj telefone, kara Charlotte donis al mi bonan konsilon, informon, subtenon, lernilojn, ktp por ke mi povu lernigi Esperanton al la lokaj geknaboj. Tiu projekto estis granda sukceso. Dum la fina jaro, nia Mondo-Ronda klaso ricevis 84 poŝtkartojn kaj leterojn de siaj internaciaj geamikoj. Pro Charlotte, la homoj en mia regiono de Nova Skotio nun konscias pri Esperanto ĉar la geknaboj bone reklamadis ĝin en la hejmoj.

Eĉ post la fino de tiu lerneja projekto kiam la sano de Charlotte pli malboniĝis, ŝi ankoraŭ multe skribis al mi pri siaj ideoj, kaj ŝi instigis min daŭrigi la Esperanto-Klubon en la lernejo por ke la infanoj ne forgesu nian mirindan lingvon. Ŝi petis ke, ĉiun februaron, la geknaboj ĉiam memoru la Semajnon de Internacia Amikeco kiam ili kantas ŝian kanteton "Sur la Tero" kaj sendas poŝtkartojn al geamikoj ĉirkaŭ la mondo.

Neniam mi forgesos tiun lertan, helpeman, afablan kaj sindoneman virinon por kiu mi havas la plej grandan respekton. Ŝi multe kontribuis al la instruado de Esperanto en la tuta mondo. La esperantistaro sentos la mankon de virino kiu amis kaj infanojn kaj Esperanton.


— Kim Keeble

EN USONA ŜTATO DE VERDAJ MONTAĜOJ EĤIS LA VERDA LINGVO



La 33a ĉiujara Nordamerika Somera Kursaro ("NASK") pri Esperanto okazis de la 8a ĝis la 24a de julio, 2002. Kvankam la kursaro okazis en San-Francisko, ĉe la pacifika marbordo, en la antaŭaj 32 someroj, ĉi somere ĝi troviĝis aliflanke de Usono en la Verda Montaro de la Ŝtato Vermont. La kursloko estis ĉe la bela tereno de la Lernejo por Internacia Trejnado ("School for International Training" aŭ "SIT"), super pentrinda valo kaj inter montoj tegitaj de arboj. Ĉeestis entute 25 studentoj, 3 instruistoj kaj 2 aliaj stabanoj.

Instruistoj estis Ilona Koutny el Hungario kaj Pollando, Alexander Melnikov el Rusio, kaj Roberto Resende el Brazilo. La studentoj venis el Usono, Japanio, Kanado, Francio, Britio, Ganao kaj Brazilo. La studentoj variis de altlernejanoj ĝis mezaĝuloj, homoj kun tre diversaj vivspertoj kaj kompetentecoj. La studentoj dividiĝis laŭ kapablo en Esperanto en kvar niveloj, de komencantoj ĝis progresintoj. Esperanto estis la sola lingvo de la kursaro, krom kelkaj vortoj en la angla en la komenco por helpi tiujn en la unua nivelo. Kaj ne nur de la kursaro. Nia verda lingvo eĥis en la koridoroj, en la manĝejo, en la dormoĉambroj de la studentoj, en la vesperaj kulturaj kaj literaturaj prezentoj, eĉ en la arbaraj vojetoj dum semajnfinaj ekskursoj.





Elstaraĵo de la kursaro estis la ĉiumatena apero de la kursara bulteno, la "NASKa Fasko", kiun redaktis Lee Miller. Ties kvar ĝis ok paĝoj plenplenis de ne nur anoncoj sed de spritaj artikoloj, eseoj, poemoj, ŝercoj, desegnaĵoj, bildoj, enigmoj, kaj gramatikeroj. La abundaj ĉiutagaj kaj libervolaj kontribuajĵoj bone elmontris la entuziasmon de la kursanoj. Dank' al kursano Tim Westover, elektitaj eroj de NASKa Fasko nun troviĝas en TTT ĉe:

<http://www.medialabinc.net/temp/fasko/NASK2002/>

Tiu ĉi kurso taŭgas por Esperantistoj sur ĉiu nivelo de lingvokapablo kaj de ĉiu lando. Pro la sukceso de la 2002-jara kurso, sendube estos simila kurso venontjare. Mi jam pretas rekomendi ĝin.

— Steĉjo



Estimata Redaktoro,

Lastatempe mi vojaĝis per aŭtomobilo en Usono por malstreĉiĝi kaj rigardi la vidindaĵojn. Mi ofte lante veturis laŭ la etvojoj, turnante la okulojn de unu flanko de la vojeto al la alia por ne maltrafi ion ajn. Mi komencis rimarki, ke ofte estis longa vico da aŭtomobiloj kiu sekvas min. Mi fieris esti ĉe la kapo de trafikserpento. Ŝajnas, ke mia kondukmaniero multe plaĉis al la homoj, ĉar pli kaj pli da aŭtoj konstante aliĝis por esti en mia trafikserpento. Kiam mi renkontis trafikserponton vojaĝantan en la mala direkto, mi ĉiam vaste svingis la brakon por atentigi la alian kondukanton, ke mia trafikserpento estas eĉ pli longa ol la lia. Jen kaj jen aŭtomobilo forlasis mian trafikserponton kaj devancante min laŭte kaj longe hupis; mi supozas, ke li volis danki min, ĉar li jam lernis sufiĉe kaj nun estas preta konduki sian propran trafikserponton.

Do, mia demando al vi estas, ĉu vi opinias, ke mi havas specialan talenton por konduki trafikserpentojn? Viaj konsilo kaj opinioj ĉiam valoras al mi.

Kon Fu Zita

Estimata S-ro Zita,

Multan dankon pro via demando. Mi ĝojas, ke vi ankoraŭ multe aktivas, kaj kun intereso mi jam notis vian lastatempan progreson cititan en la *NASKa Fasko*:

“ Nia amiko Kon Fu Zita nun havas novan laboron. Oni dungis lin por desegni kaj farbi ŝildojn kaj etiketojn, afiŝojn, reklamtabulojn, ktp. Kon Fu tre fieras pri siaj kreaĵoj. Jen bona ekzemplo de lia laboro:



Lastatempe Kon Fu Zita desegnis afiŝon por Esperanto-kursaro en Vermonto. Li deziris helpi al la studentoj ne fari erarojn pri gramatiko. Jen ĝi:

NE FORGESU LA AKUZATIVO!

Cetere, Kon Fu Zita lastatempe desegnis ŝildon por la poŝtofiĉejo. Ĝi situas super la fendo en kiun oni enmetas leterojn:

”

Metu la poŝtaĵon ĉi tie

Nun evidentiĝas, ke vi havas unikan talenton ankaŭ por gvidi trafikserpentojn. Fakte, vi estas tiom talentoplena kaj sperta pri tio, ke vi jam meritas sekvi la jenan sugeston: vi permesu al ĉiuj aliaj veturistoj esti spertaj kiel vi. Se iu sekvas vin, vi permesu al li devanci vin. Tion vi facile povos fari pro via grandanimeco – kaj pro la fakto, ke vi jam estas sperta kondukisto de trafikserpentoj.

— Via redaktoro